

Valentin Thilo,
Pretigu serioze

tradukita de Albrecht Kronenberger

1. Pretigu serioze
la korojn vi en vi.
Aperos grandioze
Jesu', la sav' de Di',
hero' el Dia glor',
de l' Patro promesita,
por lum' kaj viv' donita
el graco kaj favor'.

2. La korojn sen prokrasto
preparu al Jesu',
al via granda gasto.
Ne restu ŝtonoj plu.
Pretigu vin kun ĝoj'.
La montojn malaltigu,
la valojn ebenigu,
ke glatu Lia voj'.

3. Humilo kaj modero
valoras antaŭ Di'.
Aplombo kaj fiero
kondukas al neni'.
Obea justa kor'
orgojlon abomenos,
kaj pretos, kiam venon
Jesuo, la Sinjor'.

4. Jesuo, min pretigu
Vi mem, per bon' kaj ben'.
Advente apertigu
Vi min por via ven'.
Eniru do en min
de l' stalo kaj de l' kripo,
kaj koro, lango, lipo
eterne dankos vin.

...

*Traduko de la Germana poemo "Mit Ernst, o Menschenkinder" de VALENTIN THILO (*1607-04-19 – †1662-07-27) en Esperanton de ALBRECHT KRONENBERGER (*1940-01-21) en 2012-10-07.*

Arg-724-1459 (2012-12-23 14:25:29)

Tiu ĉi Esperantigo de la eklezia kanto aperis en la jaro 2012 en la n-ro 6 (897) de la dumonata kristano revuo "Dia Regno". La kanto estas kantebla laŭ la eklezia kristana kanto "Von Gott will ich nicht lassen".